Fanzerant

Pouso Alegre - MG - Brazilo / Brasil - Junio/julho - 2012 Jaro 3 / Ano 3 - Numero 06 / Número 06

Datrevena Numero - Numero de Aniversário
Tria Jaro - Terceiro Ano

Aprendamos com o passado
Ni lernu perpasinte

Ne malofte ni pensas, ke la historio ripetiĝas. Eble pro tio oni kreis la esprimon "mi jam vidis tiun filmon", kiu, populariĝinta, iĝis eĉ titolo de publikigita libro en Brazilo.

Não raras vezes temos a sensação de que a história está se repetindo. Talvez seja por isso que se criou a expressão "já vi esse filme", que, de tão comum, tornou-se até título de livro publicado no Brasil.

Paĝo 05 - Página 05

Dividida - Dividita

A poesio de Luana de Mello aparece nessa edição do Fanzeranto.
La poeziaĵo de Luana de Mello aperas ĉi tiun eldonon de Fanzeranto.

Paĝo 03 - Página 03

SUMIRE

8º Encontro Sulmineiro de Esperanto
Machado - MG - Brasil
8-a Sudminasa Renkontiĝo de Esperanto
Machado - MG - Brazilo

Paĝo 02 - Página 02

O belo conjunto das obras de Viviani Costa
La bela verkaro de Viviani Costa



Paĝo 04 - Página 04

SUMIRE

SUMIRE esperantigos Machado-n
SUMIRE "esperantizará" Machado

SUMIRE estas regiona renkontiĝo de Esperanto kiu okazas ĉiujare ekde 2005 en la suda regiono de la ŝtato Minas-Ĝerajso. Tiu renkontiĝo celas la disvastigadon de la transnacia lingvo Esperanto kaj la partoprenantoj havas la oportunon ĉeesti al prelegoj, ĉu portugallingve ĉu esperante, pri diversaj temoj, nome vojaĝoj, muziko, idiomoj, lingvistiko, arto kaj pri Esperanto mem, i.a. Cetere ili povas ĝui la artan vesperon kaj ankaŭ koni la ĉirkaŭaĵon de la urbo.

SUMIRE akceptas personojn, kiuj neniam antaŭe aŭdis pri Esperanto kaj pro tio celas ankaŭ montri la funkcian aspekton de la lingvo.

La venonta SUMIRE okazos en la urbo Machado je la 15-a de Julio 2012, de la 9-a ĝis 4:30 horoj posttagmeze, la temo estos "Esperanto 125 jaroj de internacia komunikado".

Fanzerant
Esperanta Divastigilo
Pouso Alegre - MG - Brasil
Caixa Postal 202 - CEP: 37550-000
fanzeranto.wordpress.com
fanzeranto@gmail.com
Direktoro/diretor: Fábio Roberto Silva - Diagramado/diagramação: Lumo Artes Empreendimentos -



O SUMIRE é um encontro regional de esperanto que acontece todos os anos desde 2005 na região Sul de Minas Gerais. Esse encontro tem como finalidade a divulgação do idioma transnacional esperanto e os participantes tem a oportunidade de assistir palestras, em português ou esperanto, sobre vários temas como viagens, música, idiomas, linguística, arte e sobre o próprio esperanto, entre outros. Além disso, eles podem desfrutar da tarde artística e também conhecer os arredores da cidade.

O SUMIRE é aberto para pessoas que nunca tiveram contato com o esperanto e por isso tem também a finalidade de mostrar a funcionalidade da língua para a sociedade.

O próximo SUMIRE acontecerá na cidade de Machado no dia 15 de julho de 2012, das 9:00 ás 16:30 horas, com o tema "Esperanto 125 anos de comunicação internacional".

Dividita

Mia koro provas kompreni,
Kion ene de ĝi estas pasante,
Nek per eraro tiu amo mi ne perdos,
En la estantaj noktoj amante min.

Kun ĉarmo, varmo, pasio kaj
volo
Mi sentas la maldecidon, malklara
menso
Miksiĝas la teruroj en miaj okuloj,
Ne ekzistas ekspliko por ami vin.
Mia koro en tiu pasio akuzas,
En la stranga situacio de mia vivo.

Mi sentas dividita kaj enfermita,
Inter tiuj du grandaj sentoj,
Tiaj belaj simplaj, en la kluzo,
Bandita emocio en miaj momentoj.

Mi flugas en tiuj strangaj pensoj,
Dividitaj inter du belaj sonĝoj.

Luana Mello
luanacj.mello@gmail.com
Francisco Beltrão - PR - Brazilo

Dividida

O meu coração tenta entender,
O que dentro dele está passando,
Nem por erro esse amor vou perder,
Nas presentes noites me amando.

Com sedução, calor, paixão e
querer,
Sinto a indecisão, mente confusa,
Mesclam-se temores ao meu olhar,
Não há explicação por te amar,
Meu coração nessa paixão acusa,
Na estranha situação do meu viver.

Me sinto dividida e reclusa,
Entre esses dois grandes sentimentos
Tão belos singelos, numa eclusa,
Emoção bandida em meus
momentos.

Voo nesses pensamentos estranhos,
Dividida entre dois belos sonhos.

Luana Mello
luanacj.mello@gmail.com
Francisco Beltrão - PR - Brasil

La bela verkaro de Viviani Costa
O belo conjunto das obras de Viviani Costa

Viviani Costa é uma artista pousoalegrense, nessa edição ela nos presenteia com algumas de suas obras que tem os títulos usando o idioma transnacional esperanto.

Viviani Costa estas "poŭzalegra" artistino, en ĉi tiu eldono ŝi donacas al ni kun kelkaj el siaj verkoj, kiuj estis titolitaj uzante la transnacian lingvon Esperanton.



Óleo sobre a tela, tamanho 50x60 ano 2011, título "Hundo".
Oleo sur ekrano, grandeco 50x60, jaro 2011, titolo Hundo.



Óleo sobre a madeira, tamanho 40x40 ano 2011, título "Junulino".
Oleo sur ekrano, grandeco 40x40, jaro 2011, titolo Junulino.



Óleo sobre a tela, tamanho 30x50 ano 2011, título Zamenhof.
Oleo sur ekrano, grandeco 30x50, jaro 2011, titolo Zamenhof.



Óleo, filtro de café reciclado e cristal natural sobre tela de madeira, tamanho 30x42, ano 2011, título "Kristala Koro"
Oleo, kaffiltrilo kaj natura kristalo sur ligna ekrano, grandeco 30x42, jaro 2011, titolo Kristala Koro.

Aliaj verkoj de Viviani Costa en:
http://vixl.arteblog.com.br/

Artigo Principal - Ĉefa Artikolo

Aprendamos com o passado

Ni lernu perpasinte

Ne malofte ni pensas, ke la historio ripetiĝas. Eble pro tio oni kreis la esprimon "mi jam vidis tiun filmon", kiu, populariĝinta, iĝis eĉ titolo de publikigita libro en Brazilo.

Okazintaĵoj iĝas historio kaj nepras ĝin koni, por ke ni konscie reagu antaŭ la nuno, tiel same, por ke ni plibone planu niajn ontajn agojn.

Konvenintus, do, ke, kiel esperantistoj, ni klopodus koni iom pli pri nia pasinto, ne nur por riĉigi nin kulture, sed ankaŭ por plibonigi niajn agojn tial, ke tiu kono, eksterdube, plilarĝigas niajn vidkapablojn kaj horizontojn. Plie, ĝi havigas al ni nemalhaveblajn modelojn por la sukceso de niaj farotaĵoj.

Kaj tion oni faras ĉefe pere de legado kaj studado de tekstoj. Evidente, ni havus plibonajn rezultojn se ni povus frekventi kursojn, kiuj disponebligus ankaŭ disciplinojn pri esperantaj historio kaj kulturo.

En la specifa okazo de la e-ista movado, estas preskaŭ deviga la legado de du libroj verkitaj de Edmond Privat (1889-1962), nome, "Vivo de Zamenhof" kaj "Historio de la lingvo Esperanto", kiuj donas al ni vastan panoramon de la e-ista movado ĝis 1927. Tiuj libroj ebligas facilan, rapidan kaj plaĉan legadon. Privat estis sviso kaj estas konsiderata la unua E-historiisto, kvankam li profesie laboris kiel docento pri literaturo.

Edmond Privat kaj Hector Hodler (1887-1920), alia svisa e-isto, estas konsiderataj bastionoj de la E-movado. En sia juneco ili konis unu la alian,


Hector Hodler

Não raras vezes temos a sensação de que a história está se repetindo. Talvez seja por isso que se criou a expressão "já vi esse filme", que, de tão comum, tornou-se até título de livro publicado no Brasil.

Os fatos se tornam história e conhecê-la é imprescindível para reagirmos de forma consciente diante do presente, assim como para melhor planejarmos nossas ações futuras.

Seria conveniente, então, que, na condição de esperantistas, nos esforçássemos por conhecer um pouco mais sobre nosso passado, não só para enriquecermos culturalmente, mas também para aperfeiçoarmos nossas atitudes, uma vez que esse conhecimento amplia-nos sobremaneira o campo de visão, alarga-nos os horizontes e fornece-nos parâmetros indispensáveis para o sucesso de nossas novas empreitadas.

E isso se faz principalmente por meio de leitura e estudo de textos. Evidentemente, obteríamos melhores resultados se pudéssemos frequentar cursos que disponibilizassem disciplinas também sobre a história e a cultura esperantistas.

No caso específico do Movimento Esperantista tem-se como leitura obrigatória dois livros de Edmond Privat (1889-1962), quais sejam, "Vivo de Zamenhof" e "Historio de la lingvo Esperanto", que nos dão uma visão panorâmica do movimento esperantista até 1927. Referidos livros são de fácil, rápida e agradável leitura. Privat era suíço e é considerado o primeiro historiador do Esperanto, ainda que tenha trabalhado profissionalmente como

kunstudis kaj, poste, kiel e-istoj, ade laboris por Esperanto.
Hodler la unua komprenis tute klare la aspirojn de D-ro Zamenhof, kaj, kun helpo de Privat, donis vivon al kelkaj el la planoj de la iniciatinto de E-o, el inter kiuj, al fondo de Universala Esperanto-Asocio – UEA, la 28-an de aprilo 1908, cele strukturigi la movadon internacskale.
Antaŭ tio, tamen, Hector Hodler, en 1907, prenis sur sin la redaktadon de la revuo Esperanto el la manoj de ĝia fondinto, kaj, de tiam, iĝis ties posedanto kaj redaktanto ĝis 1920, kiam li mortis, postlasante al ni historian heradaĵon en la kampo de organizado kaj strukturado de la esperantista movado.
Multaj el liaj pensoj estis registritaj en diversaj artikoloj, kiuj estis regule publikigitaj en la revuo Esperanto. Liaj tekstoj estas karakterizitaj per klareco de ideoj, eleganteco en la stilo kaj sincereco en la enhavo. Por Hodler, ne ekzistis tabuoj kaj li neniam hezitis ilin diskuti publike. Spite la tempon, liaj vidpunktoj estas aktualaj.
Por ĉiu, kiu partoprenas la esperantistan movadon kaj volas pliefike kontribui kun sia laborforto cele plibonigi niajn instituciojn, estas tre grave legi, studi kaj analizi tiun materialon.
Unu el la celoj de ĉi-artikolo estas instigi la malkovron kaj interesiĝon, flanke de esperantistoj, por tiuj artikoloj de Hodler, per ties tradukitaj malgrandaj citaĵoj kaj komparoj kun nia nuna situacio, por ke, tiel, ni vastigu nian kritikkapablon pri niaj institucioj, nia movado kaj ni mem.
Kiu el ni ne legis aŭ ankoraŭ ne trovas tekstojn, kiuj propagandas Esperanton kun mencio al historiaj eminentuloj kiel Leon Tostoi, Albert Einstein, Guimarães Rosa, Gandhi, el inter tiom da aliaj? Probable, la elpensintoj de tiuj artikoloj, kvankam nutritaj per bonaj intencoj, ne legis Hodler aŭ ne bone esploris la temon, cele konfirmi ties verecon. Ni vidu, do, kion Hodler skribis antaŭ pli ol 100 jaroj: "(...). Oni ankaŭ forlasu la blufon de la nomoj de eminentuloj, sciencaj aŭ registaraj, kiuj okaze ellasis favorajn vortojn pri Esperanto, sed praktike tre malmulte interesiĝas pri ĝi.(...)." (Nova tempo – novaj metodoj. Esperanto, n-ro 49, de la 20-a de februaro 1909).
La kohereco de liaj ideoj elvidiĝas en alia artikolo, du jarojn poste, kiam li esprimis sin jene: "(...). La sola efika propagando estas tiu, kiu rezultas el la uzado kaj kiu estas intime kunligita kun ĝi. (...)." (Fakaj organizaĵoj. Esperanto, n-ro 94, de februaro 1911).
Kompreneble, Hodler parolis pri la uzo de Esperanto. Fakte, ni havas plurajn e-instituciojn, kreitajn

professor universitário de literatura.
Edmond Privat e Hector Hodler (1887-1920), outro esperantista suíço, são considerados verdadeiros baluartes do movimento esperantista. Conheceram-se na juventude, estudaram juntos e, depois, como esperantistas, trabalharam muito em prol do Esperanto.
Hodler compreendeu muito bem as aspirações de Zamenhof e com o auxílio de Privat deu vida a alguns de seus planos, dentre eles a fundação da Associação Universal de Esperanto – UEA, em 28 de abril de 1908, com o fim de estruturar o movimento em nível internacional.
Antes, porém, Hector Hodler, em 1907, tomou para si a redação da revista Esperanto das mãos de seu fundador e, a partir daí, tornou-se seu dono e redator até 1920, quando faleceu, nos deixando um legado histórico no campo da organização e estruturação do movimento esperantista.
Muitos de seus pensamentos ficaram expressos em vários artigos que foram publicados regularmente na revista Esperanto. Seus textos são caracterizados pela clareza de ideias, elegância no estilo e sinceridade no conteúdo. Para Hodler, não havia tabus e ele jamais hesitou em discuti-los publicamente. Suas críticas são atuais e parecem desafiar o tempo.
Ler, estudar e analisar esse material é de extrema importância para todo aquele que participa do movimento esperantista e quer melhor contribuir com sua força de trabalho para a melhoria de nossas instituições.
Um dos objetivos deste artigo é o de fomentar a descoberta e o interesse de esperantistas para esses artigos de Hodler, por meio de pequenas citações traduzidas e comparações com nossa realidade atual, para que, assim, ampliemos nossa visão crítica sobre nossas instituições, nosso movimento e sobre nós mesmos.
Quantos de nós não lemos ou ainda não nos deparamos com textos que veiculam propaganda sobre o Esperanto com menção a personagens famosos de nossa história como Leon Tolstoi, Albert Einstein, Guimarães Rosa, Gandhi, dentre tantos outros? É bem provável que os criadores desses artigos, ainda que bem intencionados, não leram Hodler ou não se deram ao trabalho da pesquisa metódica para auferir a veracidade do que escreveram. Vejamos o que Hodler escreveu há mais de 100 anos: "(...).Deixemos de blefar com o uso de nomes de eminentes cientistas ou governantes, que eventualmente disseram algumas palavras a favor do Esperanto, mas que na prática muito pouco se interessam por ele". (Nova tempo – novaj metodoj. Esperanto, n-ro 49, de 20 de fevereiro de 1909).
A coerência de suas ideias pôde ser verificada num outro artigo, dois anos mais tarde, quando assim se

laŭleĝe, kies unua celo estas disvastigi Esperanton kaj instigi ĝian uzon. Sed tamen, ĉu tiuj institucioj bone funkcias kaj elplenumas sian rolon? Kiom el ili uzas E-on en siaj laborkunsidoj? Tiam, kiam ni ilin vizitas kaj ekrilatiĝas kun kelkaj el iliaj anoj ni havas la impreson, ke temas pri komunumo sendirekta, sencela. Ili ĉiam alparolas pri abstraktaj celoj, nepalpeblaĵoj, sed en la ĉiutago nenion priserĉas kaj, kompreneble, nenion atingas. Ni legu, do, komenton de Hodler pri tiu temo: "(...). La kunekzistado de tridek personoj de la sama profesio en Esperantujo ne sufiĉas por pravigi la fondon de nova societo. (...). La fondantoj de societo devus kompreni, ke ili havas respondecon. Senpripense fondi societon dum agrabla kongrestago signifas nenion, se oni ne klare difinas al si planon de laboro.(...)." (Fakaj organizaĵoj. Esperanto, n-ro 94, de februaro 1911).

Kiam ni pripensas pri la pluraj provoj krei favorajn leĝojn por la instruado de Esperanto en Brazilo, por ne etendi nian kritikon al eksterlandaj s-anoj, ni rimarkas, ke granda kvanto da homa energio perdiĝas unudirekten kaj preskaŭ ĉiam tiuj klopodoj donas ege magrajn rezultojn. Se nun, por ekzemplo, Esperanto estus adoptita de internaciaj organizaĵoj, ni havus seriozajn malfacilaĵojn por alfronti niajn nepovon kaj nekapablon antaŭ tia gravega respondeco.

En multaj urboj de ĉi-lando, oni diras, ekzistas leĝoj, kiuj favoras la instruadon de Esperanto en iliaj lernejoj, sed en la praktiko la rezultoj estis senfruktaj. Bonvolemaj esperantistoj, kaj politikistoj mise asesoritaj, forgesis, ke en Brazilo ekzistas neniu instruisto de Esperanto, laŭleĝe kapabligita de supera lernejo, kiu povus esti dungita aŭ submeti sin al publika konkurso por esti poste nomumita de la ŝtato, laŭ la valida leĝaro. Ekzistas kurso de E-o en neniu el la ekzistantaj Beletraj Fakultatoj de ĉi-lando, kiu ofertu tiun lingvon estu je la nivelo porinstruiistiga estu je la nivelo bakalaŭreca. Ĉi-aserto ankaŭ aplikiĝas al eksterlando. Se iam ekzistis kurso de Esperanto en iu universitato de la mondo, tio estis nur en Hungario, pere de la pionira laboro de Profesoro István Szerdahelyi (1924-1987), kiu fondis la Esperanto-fakon en la Universitato Eötvös Loránd (ELTE), Budapeŝto, en 1966, kaj ĝin gvidis ĝis sia morto.

Multaj defendos la ideon, ke, kreinte favorajn leĝojn al instruado de Esperanto, kunkreiĝas aŭtomate bezono de instruistoj, teorio tute ne pruvita per la historio de nia movado, ĉu naciskale ĉu internacskale. Kaj meze inter tiuj pripensoj pri la nuntempo kaj estonto de Esperanto, nenio pliesperiga ol ankaŭ turni nin al la rezonoj de tiuj, kiuj, flanke de Zamenhof, expressou: "A única propaganda eficiente é aquela que resulta do uso e que está intimamente ligada a ele". (Fakaj organizaĵoj. Esperanto, n-ro 94, de fevereiro de 1911). Naturalmente Hodler referia-se ao uso do Esperanto.

É fato que temos várias instituições esperantistas, criadas legalmente, com o fim primeiro de difundir o Esperanto e de fomentar o seu uso. No entanto, essas instituições estão funcionando bem e cumprindo o seu papel? Quantas delas fazem uso do Esperanto em suas reuniões de trabalho? A impressão que temos quando as visitamos e entramos em contato com alguns de seus associados é a de que pertencem a uma comunidade sem norte, sem objetivos. Falam sempre de metas abstratas, intangíveis, mas no dia-a-dia nada buscam e, é claro, nada alcançam. Façamos, então, uma leitura do comentário de Hodler a respeito desse assunto: "A existência comum de trinta pessoas da mesma profissão no meio esperantista não é suficiente para justificar a criação de uma nova sociedade. (...). Os fundadores de grupos esperantistas deveriam compreender que eles têm responsabilidade. Fundar uma sociedade impensadamente, durante um dia agradável de um congresso não significa nada se não são claramente definidos os seus planos de trabalho". (Fakaj organizaĵoj. Esperanto, n-ro 94, de fevereiro de 1911).

Quando refletimos sobre as inúmeras tentativas de se criarem Leis favoráveis ao ensino do Esperanto no Brasil, para não estendermos essa crítica a esperantistas estrangeiros, percebemos que muita energia é despendida numa determinada direção, e quase sempre esse esforço redunda em magros resultados. Se, por exemplo, o Esperanto fosse adotado atualmente por organizações internacionais, teríamos sérias dificuldades para lidar com nossa impotência e incompetência diante de uma responsabilidade dessa envergadura.

Em muitas cidades deste país, dizem, existem leis que favorecem o ensino do Esperanto em suas escolas, mas na prática os resultados foram pífios. Esqueceram os esperantistas de boa vontade e os políticos mal assessorados de que no Brasil não há um único professor de Esperanto legalmente habilitado em curso superior, que possa ser contratado ou submeter-se a concurso público para posterior nomeação pelo Estado, segundo a legislação em vigor. Não existe nenhum curso de Esperanto em nenhuma Faculdade de Letras deste país que ofereça esse idioma nas modalidades Licenciatura ou até mesmo Bacharelado. Tal afirmação também se aplica a todos os demais países. Se houve algum curso de Esperanto em alguma universidade do mundo, isto se deu somente na Hungria, por meio do trabalho pioneiro do Professor István Szerdahelyi (1924-1987), que criou

iĝis la veraj subtenantoj de la esperantista movado. Tiel,do, ni kunlegu la sekvajn vortojn de Hodler: “(...). Nia agado estas libera. Ni ne turnas nin al la registaroj, sed antaŭ ĉio fidas al ni mem kaj al la fruktoj de nia libera agado. Tio ne signifas, ke en diversaj okazoj nia organizaĵo ne povas serĉi apogon ĉe la ŝtataj aŭ urbaj aŭtoritatoj (...). Unu el la plej vanaj iluzioj estas la kredo, ke homaj leĝoj, eĉ kreitaj kun la plej laŭdindaj intencoj, povas ion krei kontraŭ la malfavoro aŭ malpreteco de la popoloj. Ni ne celu kreadon de surpaperaj leĝoj, kiuj favorus nian movadon: tiuj leĝoj estas senpotencaj, se ili ne trafas publikon jam favorigitan kaj se ili ne estas konstante kaj praktike subtenataj de elprovitaj organizaĵoj. Antaŭ ol trudi al la mondo Esperanton por la registaroj, ni laboru por trudi ĝian uzadon al la homoj, kiuj jam venis al ni. Kiam ekzistos sufiĉe potencaj internaciaj organizaĵoj, kiuj praktike uzos Esperanton, kiam ni estos vera forto, ni povos ricevi helpon de la registaroj tiom pli facile, ke ni povos vivi sen ĝi. (...).” (La agado de UEA. Parolado de Hector Hodler, direktoro de UEA, okaze de la dektria kongreso de Krakovo. En: Esperanto, n-ro 130 de septembro 1912).
Pri ambaŭ versioj de ĉi-artikolo kaj ankaŭ pri ties lingvaj misoj respondas nur ties aŭtoro.

*1- Porinstruistigaj kursoj en Brazilo estas superaj kursoj, kiuj rajtigas ties diplomitojn instrui en elementaj aŭ mezgradaj lernejoj.

Jader Rodrigues da Silva
São João Del Rei - MG - Brazilo
lingvistiko@hotmail.com

o curso de Esperanto na Universidade Eötvös Loránd (ELTE), em Budapeste, em 1966, e o dirigiu até sua morte.
Muitos poderão levantar a ideia de que ao se criarem leis favoráveis ao ensino do Esperanto, cria-se automaticamente a demanda por professores, teoria desmentida pela história de nosso movimento em nível internacional e nacional.
E em meio a essas reflexões sobre o presente e o futuro do Esperanto, nada mais confortável do que também recorrermos às ideias daqueles que, ao lado de Zamenhof, se tornaram os verdadeiros esteios do movimento esperantista. Assim, leiamos as seguintes palavras de Hodler: “O nosso agir é livre. Não nos dirijamos aos governantes, mas antes de tudo confiemos em nós mesmos e aos frutos de nossa livre ação. Isso não significa que em diversas ocasiões nossas organizações não possam buscar o apoio das autoridades municipais e do estado (...). Uma das ilusões mais vãs é a crença de que as leis humanas, criadas até mesmo com louváveis intenções, podem ter algum efeito contra a má vontade e a incompreensão dos povos. Não tenhamos o objetivo de criar leis que favoreçam o nosso movimento: tais leis são impotentes, se não alcançam o público já “convertido” à causa e se não são constantemente e na prática amparadas por organizações experientes. Ao invés de impor ao mundo o Esperanto para os governantes, trabalhemos para forçar o seu uso aos homens que já vieram a nós. Quando tivermos organizações internacionais suficientemente fortes, que na prática usem o Esperanto, quando formos uma força real, aí, sim, poderemos receber muito mais facilmente o auxílio de governantes, de forma que poderemos viver até sem esse auxílio”. (La Agado de UEA. Fala de Hector Hodler, diretor da UEA, por ocasião do 8º Congresso Universal de Esperanto em Cracóvia. Esperanto, n-ro 130 de setembro de 1912).
Sobre as duas versões deste artigo, em português e em esperanto, e os eventuais erros gramaticais nelas existentes, é responsável somente o seu autor.

Jader Rodrigues da Silva
São João Del Rei - MG - Brazilo
lingvistiko@hotmail.com